

## LA KONTRIBUO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO FAVORE AL LA PLUEKZISTO DE LA LINGVA DIVERSECO

---

1. Bazaj donitaĵoj pri la internacia lingvo esperanto
  2. Kiel ĝi favoras la lingvan diversecon
  3. Precizigoj
  4. Proponoj pri agado
  5. Konkludoj
- 

### 1. BAZAJ DONITAĴOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

- 1.1. Ĝi estas la neŭtrala internacia lingvo, uzata jam de 117 jaroj. Ĝi estis proponita de D-ro Zamenhof, sub la nomo Lingvo Internacia, per broŝuro publikigita en Varsovio en 1887. Esperanto estas la pseŭdonimo kiun uzis la aŭtoro.
  - 1.2. Ĝi akiris socian internacian uzon ekde 1905 kiam okazis la unua kongreso, kun partoprenantoj el 20 landoj, en Boulogne-sur-Mer, Francio.
  - 1.3. Nuntempe ĝi estas vivanta lingvo kun nombro da parolantoj kiu iras, laŭ pli fidindaj taksoj, de 40.000 ĝis 150.000; ne eblas precizigi la nombron ĉar ne ekzistas ĉi-rilataj censoj. Indas substreki ke 80% de la lingvoj en la mondo havas malpli ol 100.000 parolantojn. Do, ĝi estas tute normala lingvo<sup>1</sup>.
- 

### 2. KIEL ĜI FAVORAS LA LINGVAN DIVERSECON?

- 2.1. En la aktualaj kondiĉoj:

- 2.1.1. Per **diskonigo de la diversaj lingvoj kaj kulturoj**, precipe de tiuj minoritataj (okaze de kongresoj, tra interreto aŭ retpoŝto, en ekspozicioj kaj festivaloj de la lingvoj, ĉu organize ĉu kunlabore)<sup>2</sup>.

---

<sup>1</sup> La plej grava asocio havas entute ĉirkaŭ 18.000 membrojn en 111 landoj. Ili pli multas en Eŭropo, sed ĝi relative disvastiĝis en Ĉinio, Japanio, Irano, Madagaskaro kaj Kubo. Ekzistas proksimume 200 familioj kie oni uzas esperanton kiel unu el la familiaj lingvoj. Oni instruas ĝin en 151 universitatoj kaj altlernejoj krom ankaŭ en 600 unuanivelaj kaj duanivelaj lernejoj. Ĉiujare estas eldonataj pli ol 200 libroj; entute estis publikigitaj pli ol 30.000 libroj ĝis nun, inter kiuj pli ol duono estas tradukoj. Ekzistas 250 periodaĵoj, krom vidbendoj, muzikaj K-diskoj, regulaj elsendoj per radio kaj eventuale per televido. Ĝi estas ĉiutage uzata precipe en interreto, kie troviĝas 2000 TTT-ejoj kun pli ol 150.000 paĝoj, plus retbabilejoj kaj retmesaĝoj, sed ĝi uzatas ĉiutage ankaŭ en renkontiĝoj kaj kongresoj. De marto ĝis decembro 2004, ekz-e, estis anoncitaj pli ol 100 **plurtagaj** renkontiĝoj en 34 landoj. La ĉiujaraj mondaj kongresoj kunigas ĝenerale inter 1000 kaj 4000 homojn; okaze de la 72<sup>a</sup> kongreso en Varsovio en la jaro 1987<sup>a</sup> kunvenis 5496 partoprenantoj el 72 landoj. Vd. [www.lingvo.org/ghisdate](http://www.lingvo.org/ghisdate)

<sup>2</sup> En januaro 2003 la Eŭropa Komisiono akceptis antaŭprojekton pri organizado de lingvaj festivaloj, kiun prezentis la Asocio por Eŭropa Konscio kune kun Universala Esperanto-Asocio, kies sidejo troviĝas en

2.1.2. Per **praktikado de la lingva diverseco**: ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo estas almenaŭ dulingvaj. Ofte ili estas trilingvaj aŭ pli multe, kaj ili montras altan interesiĝon pri la lingvoj ĝenerale.

2.1.3. Per valorigo de la **egaleco de lingvaj rajtoj** surbaze de neŭtrala komunikado, formetante la altrudon aŭ superregon de iu ajn nacia lingvo. Ĉi tiu ideo klare troviĝas ekde la komenco en tekstoj de Ludwik Lejzer Zamenhof [Ludoviko Lazaro Zamenhof] (1887, 1900, 1905...), de la mondaj kongresoj, ktp.

---

2.2. En optimumaj kondiĉoj de ĝenerala uzado en internaciaj rilatoj, neŭtrala interlingvo favorus la pluekziston de la lingva diverseco en vastampleksa kadro de la ekologio de la lingvoj. La lingva diverseco havas ŝancojn hodiaŭ se ĝi akordigeblas kun tutgloba komunikado. Se ne eblus ilin akordigi restus nur du ekstretoj: izoligo de ĉiu lingvo aŭ malapero de la aŭtenta (ne folklor) diverseco.

Internacia neŭtrala lingvo kapablas optimume kongruigi ĉi tiujn du dimensiojn. Ĉar:

2.2.1. Ĝi favoras **ekvilibron** inter la lingvoj kaj **reciprokon** inter la kulturoj.

Okaze de ĝenerala lernado de neŭtrala internacia lingvo, ankaŭ la parolantoj de la angla bezonus ĝin lerni, kio starigus ĉiujn homojn en situacio de pli granda egaleco kaj faciligus reciprokajn plurdirektajn kulturajn interŝanĝojn<sup>3</sup>. Reduktiĝus la unulingvismo, kiu kuntrenas mensan fermiĝon al la diverseco.

La kosto de la nuntempa malekvilibro pro la hegemonio de la angla estis detaligita, en la sfero de la instruado, fare de François Grin, profesoro pri ekonomio en la Universitato de Ĝenevo. Ekzemple, Usono ŝparas ĉiujare dek ses mil milionojn (16.000 M) da dolaroj, ĉar ties elspezo por instruado de aliaj lingvoj estas nur simbola. Ĉi tiu sumo reprezentas inter 1/3 kaj 1/2b de ties budĝeto por reserĉado kaj edukado, bazo de la scienca, teknologia kaj

---

Rotterdamo.

<sup>3</sup> Unu ekzemplo pri la relative ekvilibra diverseco kiun favoras la internacia lingvo esperanto videbliĝas en la nombro de tradukoj el diversaj lingvoj: la katalogo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por la jaro 2001 prezentas almenaŭ 66 antologiojn el pli ol 30 literaturoj. La profesoro Pierre Janton, el la Universitato Clermont Ferrand, difinas ĉi tiujn produktojn, kiuj nuntempe ampleksas pli ol 10.000 verkojn el pli ol 35 landoj, kiel “la pli vastan antologion el la universala kulturo iam ajn entreprenitan por ĝenerala publiko” (*L’espéranto*, “Que sais-je?”, 1511, Presses Universitaires de France, Parizo, 1997). La *Index Translationum* [Indekso de Tradukoj] de Unesko prezentis, por la periodo 1957-1966, 70 procentojn da tradukoj devenantaj el nur 4 lingvoj: angla, rusa, franca kaj germana. En la sama periodo estis eldonitaj 344 tradukoj en la internacia lingvo esperanto, kies 50 procentoj devenis el la ĉina (103), vjetnama (33), nederlanda (23) kaj japana (22) kaj la ceteraj el multaj aliaj dise. En la periodo 1991-2003 la fontlingvoj de la proksimume 1000 tradukoj publikigitaj en esperanto estis nur 30-procente el la 4 lingvoj kiuj akaparas la ĝeneralan merkaton: angla, franca, germana kaj rusa; kun proksimume 5 procentoj ni trovas lingvojn kiel la jidan, la portugalan, la polan, la ĉinan, la japanan kaj la hungaran. Entute la distribuo respondas multe pli fidele al la monda lingva realo kaj prezentas ĝuste inversan proporcion rilate al la menciitaj 4 grandaj lingvoj: 30% el ĉi tiuj lingvoj en la esperanta merkato kontraste kun 70% aŭ pli en la ĝenerala merkato, devenantaj el la angla, franca, germana kaj rusa, kun kreskanta superrego de la angla.

armea disvolviĝoj, al kiuj nerekte kontribuas la aliaj landoj lernantaj aŭ praktikantaj la anglan<sup>4</sup>. Staras aparte la enormaj enspezoj pro la rekta vendado de ĉi-rilataj kulturaj varoj, la lingvolernaj staĝoj fare de eksterlandanoj, ktp. La unuflanka malekvilibro estas kolosa, kun ties sekva damaĝo por la diverseco.

Redistribuo de la elspezoj destinitaj al la instruado kaj al la praktikado de la diversaj lingvoj kondukus al pli proporcia kaj komparebla pliriĉiĝo akorde kun la lokaj iniciatoj sen dekomencaj nesupereblaj malegaloj. Ekz-e, en Eŭropa Unio oni povus antaŭenigi interŝanĝojn por la lernado de la neŭtrala interlingvo en **ĉiu ajn** unia lando, kune kun programita lernado de bazaj konoj de la respektivaj lingvoj. Tio ĉi favorus la diversiĝon de ofertado kaj mendado dise tra la tuta teritorio rilate al lernolibroj, feriaj staĝoj, vastpublikaj revuoj, ktp. Kaj tio vekus postan interesiĝon por vojaĝado, universitata studado, esplorado aŭ laborado disradie en malsamaj landoj, kun la certeco ke oni ĝuus la necesan interkompreniĝon. Ene de similspeca kadro la diverseco kaj egalecaj interrilatoj ricevus favoran impulson<sup>5</sup>.

### 2.2.2. Internacia neŭtrala lingvo ebligas signifan tempoŝparon, kiun oni povas dediĉi al alproprigo de aliaj lingvoj, lerneje aŭ aŭtodidakte.

Esperanto estas plenkapabla lingvo, sed rimarkinde pli facile regebla ol nacia lingvo. Ĉar ĝi konsistas je internaciaj leksemoj kaj elementoj tre disvastigitaj, kiujn eblas libere komibini akorde kun la lingvaj universaloj kaj akorde kun la universala principo de la ĝeneraliga asimilado, kiun analizis la psikologo Jean Piaget.

La grado de facileco de esperanto pruvigis per empiriaj eksperimentoj faritaj laŭlonge de ĝia historio, de post la 1920-aj jaroj (ekz-e tiuj kontrolitaj de la Ligo de Nacioj) ĝis la nuntempo. Depende de la origina lingvo kaj de aliaj variantoj, la spektro iras de 2,1 ĝis 7,4. Averaĝe rezultas, ke unu-jara lernado de esperanto egalas al 4-jara lernado de alia (nacia) lingvo. La tempoŝparon oni povas efektive dediĉi al lernado de aliaj lingvoj kaj kulturoj, ankaŭ de la angla kaj evidente de tiu propra aŭ de la najbaraj, kio favorus la kultivadon kaj plifortigon de la lingva diverseco.

### 2.2.3. Ĝi implicas la praktikan valorigon de la lingvaj **egaleco kaj diverseco**

Okaze de la lernado de internacia neŭtrala lingvo ĉiam disvastiĝas la ideo pri egaleco kaj reciproka respekto. Tute ne la ideo pri anstataŭado aŭ

---

<sup>4</sup> François Grin. 2003. "Language Planning and Economics" en: *Current Issues in Language Planning*, Vol. 4, N-ro 1, 2003. Vd. [www.etes.ucl.ac.be/Francqui/Grin-Francqui.pdf](http://www.etes.ucl.ac.be/Francqui/Grin-Francqui.pdf) (konsulto en majo 2004).

<sup>5</sup> Evidente necesus fiksi limojn al la uzado de la internacia neŭtrala lingvo, konkretigante, ekz-e, ke okaze de universitataj studoj alilande oni devus sufiĉe regi la lokan lingvon tiel ke oni kapablu sekvi la lecionojn en tiu ĉi lingvo ekde la tria aŭ kvara monato, konservante la rajton esprimi sin kaj fari la studlaborojn aŭ ekzamenojn en la interlingvo. Aŭ ke se oni translokiĝus por laborado aŭ loĝado, necesus atingi almenaŭ pasivan regon de la tiuloka lingvo post 3 aŭ 6 monatoj. Temas pri indikaj formuladoj kiujn la fakuloj devus analizi kaj konkretigi ĉiukaze.

unuflanka superrego de lingvo fremda al la historia aŭ socia grupo, kiu deziras konservi siajn koheron kaj aŭtoktonan esprimilon.

Ĉi tiu koncepto akompanis dekomence la diskonigon de la internacia lingvo esperanto.

Efektiva uzado de neŭtrala lingvo por internaciaj kontaktoj favorus ĝeneralan deeksteran valorigon kaj deinternan memestimon fare de la parolantoj de la diversaj lingvoj, kiom ajn ili malgrandas, kio estas esenca kondiĉo por la konservado de ĉiu lingvo kaj, do, de la lingva diverseco, laŭ la eksplicitaj asertoj de Mühlhäusler (1996/2002), David Crystal (2000), Akira Yamamoto (1998), Lynn Landweer (1998), Carme Junyent (1998) kaj aliaj<sup>6</sup>.

Ĉi tiun perspektivon ni povas nomi *integreca lingvoekologio*, ĉar ĝi atribuas ekvilibrantan kaj interrilatan gravecon jen al la tutgloba kaj jen al la loka aŭ nacia komunikadoj. Se ni forgesas iun el ambaŭ dimensioj aŭ polusecoj, la interlingva kontakto, kiu estas ĉiam pliriĉiga kaj hodiaŭ nemalhavebla, fariĝas malekvilibra kaj tiuj malpli fortaj suferas la misajn sekvojn.

Tiel do internacia neŭtrala lingvo estas volboŝlosilo por integreca ekolingva ekvilibro.

### 3. KELKAJ PRECIZIGOJ

Legeblas kelkaj eraraj informoj en la faka literaturo aŭ en la ĝeneralaj studoj kiuj estas korektendaj. Mi grupigos ilin en du blokojn.

#### 3.1. Esperanto *ne* celas esti la sola lingvo

3.1.1. Tio restas klare difinita en la fundamenta Deklaracio pri la esperantismo en 1905, unuanime aprobita dum la 1a Kongreso en Boulogne-sur-Mer, surbaze de vortigoj de D-ro Zamenhof. Ĉi tiu Deklaracio, daŭre valida, esprimas ke la celo estas “disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, [...] ‘ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn’ ”<sup>7</sup>.

<sup>6</sup> Crystal, David. 2000. *Language Death*. Cambridge University Press, p. 127-144; Mühlhäusler, Peter (1996 / 2002). *Linguistic Ecology. Language Change and Linguistic Imperialism in the Pacific Region*. Routledge, New York, 2002, p. 322-324; Yamamoto, Akira Y. 1998. “Retrospect and prospect on new emerging language communities”. En Ostler, Nicholas (ed.), *Endangered languages: what role for the specialist?* Bath: Foundation for Endangered Languages, p. 114; Landweer, M. Lynn. 1998. “Indicators of ethnolinguistic vitality: case study of two languages — Labu and Vanino”. En Ostler (ed.), 64-72, v. cit.; Junyent, Carme. 1998. *Contra la planificació. Una perspectiva ecolingüística*, Ed. Empúries, Barcelona, p. 180, kaj ĝenerale la tuta lasta ĉapitro: “Bazoj por ekolingva planado”.

<sup>7</sup> Vidu, ankaŭ, plurajn temojn de la tutmondaj esperantokongresoj: Majenco (1958): *Reciproka aprezo de kulturaj valoroj*; Madrido (1968): *Kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio*; Portland (1972): *Monda turismo kaj lingva diverseco: valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj*; Beogrado (1973): *Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko*; Stokholmo (1980): *Diskriminacio (racia, ekonomia, kontraŭ virinoj aŭ pro seksa orientiĝo, religia, lingva)*; Havano (1990): *Esperanto, evoluo kaj kultura diverseco*; Montpeliero (1998): *Mediterraneo: ponto inter kulturoj*; Pekino (2004, 24-31 julio): *Lingva egaleco en internaciaj rilatoj*. Notindas ankaŭ la *Praga Manifesto*, lanĉita dum la tiuurba kongreso en la jaro 1996, precipe ties sesa punkto “por lingva diverseco”.

3.1.2. Siaflanke, Unesko, en Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco okazinta en Montevideo (Urugvajo) en 1954, en ties paragrafoj 4221 kaj 4222 konstatas ke la rezultoj atingitaj per esperanto por la proksimigo de la popoloj de la mondo respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko. Inter ĉi tiuj celoj troviĝas “stimuli la fekundan diversecon de l’ kulturoj”, kiel memorigis la nuna Ĝenerala Direktoro, Koïĉiro Matsuura, dum la inaŭguro de la Barcelona Forumo. La rezolucio de 1954 estis konfirmita per nova Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco en Sofio (Bulgario) en la jaro 1985, kompletigante ĝin per pluraj konsiloj al la ŝtatoj-membroj, inter kiuj menciindas la instigo al la enkonduko de studprogramo pri la lingva temo kaj pri esperanto en la lernejoj kaj en la institucioj de supera edukado.

## 3.2. Esperanto *ne* fiaskis

3.2.1. Ĉar ĝi fariĝis *vivanta lingvo*. Inter la centoj da projektoj kaj eksperimentoj de internacia lingvo, nur esperanto sukcesis ekesti vivanta lingvo en grado plenrajte komparebla, internacie uzata de post 4 generacioj, kun riĉa kultura tradicio, originala kaj tradukita, kaj kun disvastiĝo en ĉiuj kontinentoj. Fakte, temas pri senprecedenta sukceso en la kulturhistorio.

3.2.2. Rilate al la celo fariĝi ĝenerale uzata internacia lingvo, ankaŭ ne eblas aserti ke ĝi fiaskis.

3.2.2.1. Unuavice, Zamenhof prezentis tiun celon sen fiksa tempolimo. En la jaro 1900 li skribis: “povas esti ke ĝi venos post unu jaro, post dek jaroj, post cent jaroj aŭ eĉ post kelkaj centoj da jaroj” kaj ankaŭ ke eble la ideo endormiĝos “je tutaj dekjaroj”.

3.2.2.2. Aliflanke, se la celo pri ekvilibra kunvivado de la lingvoj surbaze de internacia neŭtrala lingvo dezirindas, kiel logikas diri ke ĝi fiaskis? Pri io dezirinda kaj pozitiva por la homaro oni ne asertas ke ĝi fiaskis, sed ke oni *ankoraŭ ne atingis ĝin*, kaj do necesas laboradi tiucele. Ekz-e, se oni kredas tion pozitiva kaj dezirinda, oni ne asertas ke “la egaleco inter viro kaj virino fiaskis” (ĉar en multaj landoj kaj cirkonstancoj diskriminacio realas), aŭ ke “la paco fiaskis” (ĉar plu ekzistas militado en multaj landoj). La samon eblas diri pri alfabetigado, rasismo, ktp.

3.2.2.3. Krom la favoraj opinioj siatempe esprimitaj far renomaj lingvistoj (Max Müller, Antoine Meillet, Edward Sapir, Mario Pei...), pozitive konsideras la ŝancojn de la internacia lingvo aŭtoroj kiel André Martinet (Praktika Lernejo de Altaj Studoj, Francio; iama membro de la asocio IALA), 1991, Umberto Eco (verkisto kaj semiologo), 1993/1996, Tove Skutnabb-Kangas, 2000, Robert Phillipson, 2003 <sup>8</sup>.

---

<sup>8</sup> Martinet, André. 1991. “Sur quelques questions d’interlinguistique. Une interview de François Lo Jacomo et Detlev Blanke”. En: *Zeitschrift für Phonetik. Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung*, 44, p. 675-687; Eco, Umberto. 1993. *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea* [Esperanta traduko 1996: *La serĉado de la perfekta lingvo*; Angla traduko 1995; Germana traduko 1994; Hispana traduko 1994, k.a.], en la ĉapitro 16a: “La internaciaj helplingvoj”; intervjuo kun Paul Amar, TV-kanalo *Paris-Première*, 1996.02.27, menciita en Cherpillod, André. 2003. *Une langue pour l’Europe? Mais oui! Pour sauver les langues de l’Europe*, Éd. La Blanchetière, Courgenard, p. 57; Skutnabb-Kangas, Tove. 2000. *Linguistic genocide in education — or worldwide*

Simile estas *eraro* aserti ke la angla plenumas la funkciojn kiujn celis esperanto (kaj do ke esperanto fiaskis antaŭ la angla). La impona disvastiĝo de la angla dum la lastaj jardekoj estas, inter alie, klara pruvo pri la bezono je lingvo por internacia komunikado. Sed la demando pri integreca lingvo-ekologio favoranta la pluekziston de la lingva diverseco ne estas solvita pere de la angla, eĉ se temas pri baza angla lingvo. Ĉu en unu aŭ en alia formo, ĝi ne estas neŭtrala kiam intervenas denaskaj parolantoj, nek reciproka, kaj ne eblas sufiĉe regi ĝin sen malekvilibraj investoj je ekonomia, tempa kaj identeca niveloj<sup>9</sup>.

---

#### 4. PROPONOJ PRI AGADO

- 4.1. Esencas levi la **prestigon** de la internacia lingvo kune kun la prestiĝo de la valoro de ĉiuj lingvoj, t.e., levi la konon pri la nepra utileco de internacia neŭtrala lingvo por la egalrajta valorigo de ĉiuj lingvoj. La fundamento por ajna socia ŝanĝo estas la konsciigo kaj la disvastigo de la ideoj pli frue al la konkretaj praktikoj. Por levi tiun prestiĝon ekzistas pluraj vojoj: seriozaj esploroj, publikaj aŭ privataj investoj (por favori la merkatan bildon: oni ŝatas nur tion kio perceptatas kiel moderna kaj aktuala), konsiderante ke la kosto pro la perdo de la lingva diverseco multe pli grandas ol la kosto de investo subtenanta la diversajn lingvojn kaj samtempe neŭtralan internacian komunikilon. La socia (do, ankaŭ ekonomia) kosto kiun kuntrenus la perdo de la diverseco estis klare prezentita far David Crystal (*Language Death*, Cambridge University Press, 2000, pàg. 32-67) kaj aliaj. Ankaŭ en dokumentoj de la Eŭropa Unio.
- 4.2. Necesas **plurfakaj studoj** pri la lingva komunikado je monda aŭ je kontinenta niveloj (laŭ perspektivoj psikologia, sociologia, amaskomunikila, ekonomia, lingvopolitika, jura, filozofia, antropologia, historia, pedagogia, informadika...). Profesoro Robert Phillipson konsideras ke nenio fariĝis sur la kampo de lingvopolitiko ene de ellaborita multfaka kadro, almenaŭ en Eŭropo<sup>10</sup>. Temas pri teoria aspekto ofte forgesita malgraŭ ĝia decida graveco por la kunvivado.
- 4.3. Efektivigi kunordigitajn **eksperimentajn aplikojn** de la internacia lingvo. Ekz-e, kun la celo pritaksi en kompleta statistika maniero la propedeŭtikan valoron de esperanto en la instruado kiel optimuma preparbazo por la lernado de aliaj lingvoj danke al ĉi ties reguleco, kiel eblas dedukti de la eksperimentoj

---

*diversity and human rights?*, Lawrence Erlbaum Ass., Mahwah-New Jersey-London, p. 280-284; Phillipson, Robert. 2003. *English-Only Europe? Challenging Language Policy*, Routledge, London-New York, p. 171-174 [Esperanta traduko 2004: *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko*].

<sup>9</sup> La ekzemploj citantaj Danlandon, Norvegon aŭ Svedion ne estas reprezentaj pri la diskriminacia kaj asimila potencialoj de la angla, se ĝi fariĝus ĝenerale uzata lingvo; inter aliaj kialoj, ĉar temas pri sendependaj landoj ankaŭ ĝermanlingvaj kaj diference, ekz-e, de la katalunligvaj teritorioj ne temas pri landoj kun antaŭgrundo malsimetrie dulingva. Ĉiel ajn, ankaŭ en la menciitaj landoj ne ekzistas egaleca rilato koncerne al anglalingvanoj, kiel tion pruvas la donitaĵoj prezentataj de Robert Phillipson (2003), v. cit., p. 167-171.

<sup>10</sup> Phillipson, Robert. 1999. "International Languages and International Human Rights". En M. Kontra, R. Phillipson, T. Skutnabb-Kangas, T. Várady (eds), *Language: a Right and a Resource*, Budapest: Central European University Press.

kontrolitaj de la Universitato de Paderborn (Germanio)<sup>11</sup>. Alia propono estas enkonduki ĝian eksperimentan instruadon samtempe en kelkaj lernejoj de diversaj landoj sur la bazo de interregistara konvencio subskribita de almenaŭ tri landoj, prefere samlimaj, ekz-e en Eŭropa Unio. Poste oni povas organizi interŝanĝojn, renkontiĝojn, ktp., kiuj helpus al la unueco kaj al la diverseco, kiel prezentite en la punkto 2.2.1(c). Similaj aplikoj jam estis faritaj, tamen en malvasta amplekso kaj sen interregistara konvencio.

## 5. KONKLUDOJ

- 5.1. Internacia neŭtrala lingvo necesas por ekologia ekvilibro de la lingvoj kun la celo konservi la lingvan diversecon en mondo karakterizita de tutplanedaj interkomunikado kaj interŝanĝoj.
- 5.2. Ĉi tiun perspektivon ni nomas *integreca lingvoekologio*. Internacia neŭtrala lingvo estas decida elemento, volboŝlosilo por integreca ekolingva ekvilibro<sup>12</sup>.

---

<sup>11</sup> Frank, Helmar, B. Frank-Böhringer, Yashovardhan (red.). 1982. *Lingvo-kibernetiko / Sprachkybernetik*, ed. Gunter Narr Verlag, Tübingen; Frank, Helmar. 1983. "Europäische Sprachpolitik. Aufgabe, Lösungsangebote und Schwierigkeiten". En: *Aus Politik und Zeitgeschichte. Beilage zur Wochenzeitung "Das Parlament"*, B 11/83, vom 26-03-1983, p. 26-38; Corsetti, Renato/La Torre, Mauro. 1995. "Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l'esperanto", En *Language Problems & Language Planning* (Amsterdam: ed. CED/Benjamins) 19, n-ro. 1, p. 26-46. La ĝisnunajn esplorojn sur ĉi tiu kampo, kiuj estis faritaj precipe de la dua duono de la 1970-aj ĝis la 1990-aj jaroj, eblas resumi dirante ke 2 jaroj de ILo (Internacia Lingvo Esperanto), sekvataj de 5 jaroj de angla lingvo egalvaloras pli ol 7 jarojn de anglalingva instruado. Per la sama temp-investo, oni atingas pli bonan regon de la angla plus la konon de la interlingvo esperanto je nivelo adekvata por normala komunikado, celo kiun atingas 70-80% de la gelernantoj. La idealo estas ke ankaŭ la instruadon de ILo (esperanto) plenumu la instruistoj de la angla aŭ de alia fremda lingvo. Vd. informojn pri la bazoj por tiulinia projekto, nomata NEIGHBOUR, en [www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/neighbor/indekso.htm](http://www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/neighbor/indekso.htm)

<sup>12</sup> Aliaj konsult-verkoj: Bastardas, Albert. 1996. *Ecologia de les llengües. Medi, contacte i dinàmica sociolingüística*, Ed. Proa, Barcelona; Fettes, Mark/Bolduc, Suzanne. 1998. *Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique*. Universala Epsranto-Asocio, Rotterdam; Phillipson, Robert. 2003. *Linguistic Imperialism*, (6<sup>a</sup> eldono/ 1<sup>a</sup> eld. de 1992); Piron, Cláude. 1994. *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens*, Éd. L'Harmattan, Paris; Solé i Camardons, Jordi. 1998. *Poliglotisme i raó. El discurs ecodiomàtic de Delfi Dalma u*, Pagès Editors, Lleida; Wolton, Dominique. 2000. *Internet i després...? Una teoria crítica sobre els nous "media"*, ECSA, Barcelona [franca originalo de 1999, Flammarion, Paris], precipe la ĉapitro 5: "La e uropa dezerto"; *Declaració universal de drets lingüístics [Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj]*, Barcelona, 1996, precipe "Preliminars" ("Sojraj Vortoj").